# LA SKOLTA MONDO



OFICIALA ORGANO DE LA
SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

NE ISSN 0037-6558

NUMERO 3 VOLUMO 7 TRIA JARKVARONO 1988

# SEL FESTAS

En Oktobro de 1988, nia Ligo fariĝis 70 jara kaj nia informilo fariĝis 40 jara. Sen ia dubo ambaŭ povis supervivi kun kelkaj malfacilaĵoj, kaj gravaj problemoj. Sed ambaŭ havis sukcesojn kaj venkojn eĉ pli ol la pensitaj.

Nia institucio fariĝis la unua monda organizo por geskoltoj ĉe la komenco de tiu ĉi jarcento, kaj eble ne ĉiuj el la membraro scias ĝian historion; pro tio ni decidis fari etan skizon pri ĝi kiel baza informado por ili. La informojn oni prenis el "Orjubileo de Skolta Esperantista Ligo" eldonita en 1968.

"Dum la unua mondmilito, angla eks-patrolestro Alexander William Thomson, flegisto kaj brankardisto en la francaj bataltranĉeoj, ekhavis ideon pri 'ĝemeligo' de la du de li amataj movadoj... la skolta kaj la interlingva.

"Tiucele, li verkis libreton kaj eldoniĝis ĝi en oktobro 1918, sub titolo "PROPONO PRI SKOLTA ESPERANTISTA LIGO" de Avoto.

"En tiu ĉi libro, li faris 17 proponojn; la kvina prezentis la celojn: Disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto; Disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj ; Krei skoltan literaturon en Esperanto; Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon; Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

Inter la proponoj esti tiu, kiu tekstis "Ke Sel ne funkciu ĝis 200 personoj promesis aliĝi". Ankaŭ estis proponita skolta terminaro kaj je la fina paĝo troviĝas "Aliĝa Promesilo". Kvankam la respondoj ne estis tre rapidaj, la aliĝantaro kreskis, kaj aperis la unuajn Naciajn Agentojn (nun Naciaj Reprezentantoj) en multaj landoj kaj en ĉiuj kontinentoj. La Ligo komencis vivi.

PREZIDANTOJ estis:
1919-1936 Alexander W. Thomson
1936-1940 Norman Booth
1948-1952 Douglas H. Davis
1953-1965 Jozef Van Gulck
1965-1970 F. Douglas Murphy
1970-1980 John Berggreen
1980- ? C. Stanley Otto

SEKRETARIOJ estis:
1918-1921 Kenneth G. Thomson
1921-1922 John W. Leslie
1922-1936 Norman Booth
1936-1952 F. N. Blythe
1952-1953 Hnery G. Bell
1954-1961 Charles Bardsley
1961-1964 C. Stanley Otto
1964-1988 J. K. Hammer

KASISTOJ estis:
1918-1921 Kenneth G. Thomson
1921-1926 C. B. Quain
1926-1938 Douglas H. Davis
1938-1952 John H. Wescott
1952-1954 F. N. Blythe
1954-1961 Charles Bardsley
1961-1988 David Withey

La oficialaj organoj de la Ligo estis "LA SELO"(1920-21) "BULTENO"(1921); en 1924 SEL-informoj troviĝis en "ESPERANTISTA JUNULARO". En 1926, ni havis propran kaj belaspektan revuon nomita "SKOLTA HEROLDO", kiu daŭris ĝis la jaro 1931, tiam aperis la "SKOLTA BULTENO"-n ĝis 1939. Dum la Dua Mondmilito sporadajn informilojn aperis. En oktobro de 1948 naskiĝis "LA SKOLTA MONDO". La antaŭaj REDAKTOROJ estis:
1948-1949 John H. Wescott
1949-1961 George Rust
1961-1964 C. Stanley Otto
Davis Withey
1964-1987 Hans Amund Rosbach

Gratulojn al vi ĉiuj kaj al ĉiuj, kiuj faris egajn kaj etajn laborojn por S.E.L. Dank'al vi ĉiuj nia Ligo vivas.

1918 1988

SKOLTA ESPERANTO - LIGO

ORGANIZAĴO

La ĉefa tasko de SEL estas disvastigi la internacian lingvon inter geskoltoj. Kvankam la Skolta Movado ĉie havas la samajn principojn, la Naciaj Sekcioj montras diferencojn. Tial SEL preferas labori per la helpo de Naciaj Reprezentantoj kaj aliaj kunlaborantoj.

Nacia Reprezentanto (NR) laŭ la Statutoj reprezentas la Centran Komitaton en sia lando, kolektas la kotizojn kaj gvidas la Nacian Sekcion.

Peranto (P) helpas al SEL en la transdono de informoj pri/kaj al la junularo en sia lando.

Kontaktulo (K) estas niaj korespondantoj, kiuj interesiĝas pri junulara laboro, ofte en landoj sen (oficiala) skolta asocio.

LA CENTRA KOMITATO

Prezidanto — FRANCO ABRIANI, Via Falconetto 24, I-37131 Verona, Italio

Ĝen. Sekretario — DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Ave. Waterloo, Liverpool, Britujo, L22 3YE

Kasisto — LAWRENCE MEE, 19 Cranbury Road, Eastleigh, Hampshire, Anglujo SO5 5HB

Redaktoroj — MICHEL BASSO, 153 Rue Clémenceau, F-68000 Colmar/Wintzenheim, Francio

HECTOR CAMPOS GREZ, Casilla 231, Curicó, 7a Región, Ĉilio

AFRIKO:

| | | |
|---|---|---|
| * Malgaŝa Respubliko | NR | Roger Randrianekena, T.P., Box Postale 14, Ambatondrazake. |
| * Niĝerio | K | Kuki Tubota, Arewa Textiles Ltd. P.O. Box 288, Kadunda South. |
| * Sudafriko | P | Henry W. Appel, 8 St. Michael RD New Redruth, Alberton 1450. |
| * Zairio | P | Ngangu Duantoni-Bakidila, Esperanto Instituto, Box Postale 13 Lukala, Bas-Zaïre. |

AMERIKO:

| | | |
|---|---|---|
| * Argentino | K | Enzo Basilio, C.C. 78, Zona Rural, RA-2630 Firmat, Santa Fé. |
| * Brazilo | NR | Eluizio Bueno Rodrigues, Soro - kaba Esperanto-Klubo, Caixa Postal 234, 18100 Sorocaba (SP). |
| * Ĉilio | NR | Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curicó, Séptima Región. |
| * Jamajko | NR | Arpad Ronai, P.O. Box 10, Kingston 8. |
| * Kanado | NR | Norman Henderson, 114 University Park Drive, Regina, Saskachewan, 54V OE4. |
| | NR | Paul Ronald, 45 10th. Avenue, Roxboro, Québec H8Y 2N3. |
| * Kostariko | NR | Melvin Segura, Apartado 1913, San José. |
| * Urugvajo | K | Alberto Barrocas, Casilla 1040, Montevideo. |
| * Usono | NR | Robert W. Rapp, 2043 Brannon SW Austell, GA 30001. |
| * Venezuelo | K | Venezuela Esperanto-Asocio, A - partado 3833, Caracas 101. |

AZIO:

| | | |
|---|---|---|
| * Hinda Unio | K | M. A. Vias, 17/6 Chholi Gwaltoli, 452001 Indore MP. |
| * Indonesio | P | Liem Tjong Hie, Dj. Raya Trengguli 2, Semarang 50241 |
| * Japanio | NR | Fumiko Kamaĉi, 3-4-4 Kasumigaoka, Sakai, Osaka 590. |
| * Libano | NR | Salah Ghanem, P. O. Box 11 9254, Beirut. |
| * Pakistano | NR | Abdul Salam, Haji Aima P.O., Kala Gujran, Jhelum. |
| * Sirio | K | Chassan T. Mawsily, P.O. Box 8067, Damascus. |
| * Sri Lanka | NR | Ronald Peries, 4 Sri Vijaya Rd. Colombo 6. |
| * Tajlando | P | Marcel Perray, G. P. O. Box 1846, Bangkok. |


EUROPO:

| | | |
|---|---|---|
| * Aŭstrio | NR | Franz Schwärzler, Kirchstr. 26, A-6900 Bregenz. |
| * Britio | NR | David H. Withey, 21 Brookfield Ave., Waterloo, Liverpool L22 3YE. |
| * Ĉeĥoslovakio | K | Pere de la Centra Komitato. |
| * Danlando | NR | Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup. |
| * Finnlando | NR | Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen. |
| * Germanio, D.R. | K | Johann Haupt, Thalenserstr. 11, Neinstedt/Harz, DDR-4307 |
| * Germanio, F.R. | P | Rudolf Fischer, Gustav-Adolfstr. 2/A, D-4418 Nordwalde. |
| * Hispanio | NR | Luis Gilpérez, Apartado 7131, E-41080 Sevilla. |
| * Hungario | K | Pere de la Centra Komitato. |
| * Islando | K | Baldur Ragnarsson, Islanda Esperanto-Asocio, Postholf 1081, Reykjavík. |
| * Italio | NR | Franco Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. |
| * Malto | K | Anthony Mercieca, 20 Valetta Rd. Qormi. |
| * Nederlando | NR | J. K. Hammer, Taxusstraat 7, NL-1505 AA Zaandam. |
| * Norvegio | NR | G. Sverre Braut, N-4340 Bryne. |
| | NR | Hans A. Rosbach, Bambleveien 2 N-3700 Skien. |
| * Pollando | K | Pere de la Centra Komitato. |
| * Rumanio | K | Pere de la Centra Komitato. |
| * Svedio | NR | Wim Posthuma, Soldatgatan 40, S-72345 Västeras. |

OCEANIO:

| | | |
|---|---|---|
| * Aŭstralio | NR | J. Dimo; 9 Rocky Gully Road, Coominya, QLD 4311. |
| * Nov-Zelando | NR | Gwenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4. |

LA 73-A UNIVERSALA KONGRESO (ROTTERDAMO, 1988)



Malgraù la grandaj timoj kiuj ekzistis pri tio antaùe, la 73ª Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdamo, estis tre sukcesplena. La organizado estis perfekta kaj la kongresejo estis tre agrabla.

Dum la Kongreso 16 personoj el 11 landoj vizitis la kunvenon de SEL. Kun granda miro ili konstatis, ke mankis oficialaj funkciuloj de SEL, kaj ankaù oficialaj komuniko aù saluto mankis.

Pro tio la iama Sekretario J. K. Hammer devis decidi, ke li prezidu la kunvenon, kaj akcepti la gastojn.

Li skizis la nunan situacion de SEL kaj sian propran pozición en ĝi, proksimume kun la samaj vortoj kiel en la adiaùa artikolo en La Skolta Mondo 2/1988.

Li emfazis la grandan valoron de la Skolta Movado en la evoluo de la junaj ŝtatoj ekz. en Afriko, kaj la grava kontribuo de Skoltado al la vivo kaj spertoj de multaj gejunuloj.

Eĉ kiam la bastono kelk-foje estas malrekta, oni per ĝi povas fari ĝustajn batojn, li diris.

La ĉeestantoj kun ĝojo komprenis, ke nun nova sekretario funkcias, kaj ke SEL trovis ankaù novan kasiston. Oni tre laùdis la energion de la novajn redaktoroj de La Skolta Mondo, kaj de ties bela kaj alloga aspekto.

Pola sinjorino atentigis pri grupo de membroj de la Internacia Skolta Movado, kiu ankoraù aktivas en Pollando, kaj ŝatus pli intensiva kontakto kun la skoltaro en aliaj landoj. Eble ŝi pri tio verkos artikolon por LSM.

El Usono venis signalojn, ke oni tre ŝatus havi aktivan Reprezentantoj de SEL en tiu lando.

Sinjoro el Israelo klopodos varbi por SEL inter junuloj al kiuj li instruas la internacian lingvon.

Pluraj vizitantoj kunportis ekzemplerojn de la informa broŝuro "VASTAJ HORIZONTOJ" al sia lando.

Raportis, J. K. Hammer.

Sendu skoltgazetojn tutmondajn

ĴAMBOREO PER LA AERO:

La ĵus pasintajn 15-an kaj 16-an de Oktobro, okazis la 31ª Ĵamboreo per la Aero (JOTA). Ĝi estas la plej grava kaj granda renkontiĝo de geskoltoj en la mondo, kaj ĝi konsistas en radio-kontaktoj inter diverslandaj geskoltoj kun la tre kara helpo de geradioamatoroj. Ĉiujare partoprenas ĉ. 300 000 geskoltoj, kiuj pro ĉi-ĵamboreo komencas novajn amikecojn, interŝanĝadon de insignioj, poŝtmarkoj, ktp. Sed ankoraù nia lingvo ne estas aùskultata. Eble venontjare, ĉu ne?

SKOLTA TENDARO EN FINNLANDO:

El Finnlando ni ricevis tre interesan inviton: "Ĉu vi intencas vojaĝi al Finnlando dum la somero 1989? Ĉu vi eble interesiĝas pri la ebleco partopreni skoltan tendaron en suda Finnlando la 1-an ĝisla 9-an de aùgusto? Temas pri la tendaro OKEJ, kun ĉ. 1 000 partoprenantoj, ĉefe svedlingvanaj geskoltoj el Finnlando.

Informojn oni povas peti ĉe Anna Margareta Ritanäki, Källkullen, SF-25700 Kimito, Finnlando."

## ETAJ NOTOJ

EL LA REDAKTOROJ:

* Ni devas enpoŝtigi la revuojn tutmonden. Kelkaj eroj revenas al ni. Bonvolu, averti nin pri viaj adreŝ-ŝanĝoj kiel eble plej baldaù. Male, vi perdos tiun numeron kaj la ceterajn.

* Se vi deziras helpi nin en la redaktado, bonvolu sendi artikolojn preslitere aù maŝin-skribite. Se vi ne kuraĝas mem verki artikolojn aù traduki ilin; sendu fotokopio(j)n kaj ni tradukos ĝin/ilin. Ni scipovas la anglan, francan, germanan kaj hispanan lingvojn.

* Ni pardonpetas pro la prokrasto de la 3ª numero de 1988, sed okazis pluraj aferoj: striko en la Brita poŝto, kiun malpermesis kunordigi la "ekonomiaj problemoj" kun la nova kasisto; korektigo, kompletigo kaj nova ordigado de la dresaro por dissendo de LSM, difekto en la maŝinaro ĉe la eks-Sekretario; kaj profesiaj, studentaj kaj skoltaj laboroj de la redaktoroj. PARDONON NI PETAS!!!!!

# LEGANTO

Fraùlino Anna Margareta Ritanäki el Finnlando, demandis nin : KIOM DA LEGANTOJ HAVAS LSM KAJ KIE ESTAS ILI? Kiel ĝi povas esti interesa demando, jen respondo por vi:

AFRIKO: Angolo (1), Madagaskaro(3), Niĝerio(1), Senegalo (1), Siera-Leono(1), Sudafriko(9), Zairio(3) kaj Zambio(2).

AMERIKO: Argentino(3), Brazilo(13), Ĉilio(27), Kanado(8), Kostariko(4), Jamajko(3), Meksiko(1), Urugvajo(2) Usono (10) kaj Venezuelo (1).

AZIO : Hinda Unio(2), Indonesio(2),Japanio(13), Israelo(1), Ĉinio(3), Irano(1), Korea Respubliko(2) , Libano(2), Sri Lanko(4), Sirio(1), Tajlando(4).

EUROPO : Aùstrio(8), Belgio(2), Britio(51), Bulgario(1), Ĉeĥoslovakio(7), Danlando(25), Finnlando(6), Francio(5), Germana DR(4), Germana FR(14), Greklando (1), Hispanio(12), Islando(1), Hungario(4), Italio(55), Jugoslavio(1), Malto(3), Nederlando(12), Norvegio(23), Pollando(17), Rumanio(2), Svedio(6) kaj Svislando (1).


Nia legantaro konsistas el 403 homoj el 54 landoj. Ĉu eblas pligrandigi la rondon? Tio dependas ankaù de vi, propagandu kaj helpu nin!!!!

## LETEROJ



El Germanio FR skribis S-ro Rudolf Fischer, Germana Esperanto-Asocio kaj nia peranto en tiu grava eùropa lando. Post doni al ni lian novan adreson kaj rimarkigi la erarojn en la adres-slipoj; li rakontas lian sperton kiel peranto. Li diras, "estas iom strange, ke en nia lando inter skoltoj ne estas esperantistoj kaj inverse, kvankam ni havas florantan junularan esperanto-movadon. Mi iom reklamis inter la skoltoj, sed neniam troviĝis iu aktivulo, kiu vere transprenis ion... Do,

# VOLVOJ



OKFORMA ĈIRKAÙVOLVO


Oni uzas ĉi tiun volvon por kunigi du stangojn, trunkojn aù tubojn, kiuj devas resti tute paralelaj.

Same kiel ĉe la aliaj volvoj jam montritaj, oni komencas ĝin per mastkroĉo. Due, oni devas fari plurajn turnirojn okformajn, kunigante ambaù stangojn.

Poste oni devas fari du aù pli turniroj meze, streĉante por ke la volvo restu tre firma.

Je la fino, oni devas fari mastkroĉon, ĝenerale en la alia stango, t.e., en tiu kontraùa al tiu sur kie ni komencis la volvon.

## APLIKOJ



# LA MONDA SKOLTA INSIGNO



(Dua Parto)

Nun ni donas al vi la duan parton de ĉi-interesa enketo pri la deveno de nia Skolta Insignio. La unua parto aperis en LSM 2/1988, kaj verkis ĝin nia leganto el Brazilo, S-ro M.A. Ramos; nun ni daŭrigas la enketon laŭ aliaj informoj el pluraj skoltaj libroj.


Krom la eblaj devenoj kaj signifoj de la insignio, estas aliaj tre interesaj.

Kiam Baden Powell fondis skoltismon, li pensis pri la plej taŭga identigo: ĝi devu signifi la unuecon kaj kunigon de la Skolta Movado. Kaj li elektis tiun liliflo-ron. Ĝi estis uzita je la unua fojo en Aŭgusto de 1907, dum la Brownsea Tendaro.

Kun ne tro grandaj ŝanĝoj, la skolta insignio estas uzata tutmonde por montri la Skoltan Frataron kaj la bonan civitanecon.

Kelkaj aliaj signifoj, krom la jam donitaj, estas aliaj simboloj en ĝi kiuj rememoras al ni la jenon:

La du steloj: la vivo je pura aero ĉe la naturo kaj la dek artikoloj de la Skolta Leĝo.



La ŝnuro: La unueco de la Skolta Frataro.

La rubandflago ĉe la malsupra parto, kun la moto "Ciam Preta": La rideto, kiun ĉiu skolt(in)o devas havi en sia vizaĝo ĉiam.

Neniam forgesu kunporti vian skoltan insignion, eĉ kiam vi ne uzas vian skoltan uniformon. Estu fiera skolto, kaj kondutu kiel tia.

La vorto JAMBOREE estis uzita de la sioux-indianoj por nomi iliajn gajajn renkontiĝojn.

En 1917, Baden Powell adoptis ĝin kiel la plej bona nomo por la internaciaj renkontiĝoj de geskoltoj inter 12 kaj 16 jaroj.

Ekde 1920 okazas preskaŭ ĉiun kvaran jaron, Tutmondan Ĵamboreon, kaj same okazas la Tutamerikan Ĵamboreon.


La 6-an Tutamerika Ĵamboreo okazos en urbo Villarrica (Ĉilio), kaj tie kunvenos ĉ. 10 000 geskoltoj el 28 landoj, ekde la 18-an ĝis la 26-an de januaro 1989; kune troviĝas la granda lago kaj la vulkano.




Neniam antaŭe okazis iun ĵamboreon tiel sude en la Amerika Kontinento, pro tio oni nomas ĝin "JAMBOREE AUSTRAL" (plej suda ĵamboreo). Jam konfirmis la partoprenadon de ĉ. 25 landoj, kaj oni atendas la respondoj de la aliaj. Pliaj informoj, turni sin al Asociación de Guías y Scouts de Chile, Comisión Organizadora JAMPAM, Casilla de Correos 21113, Santiago 21, Chile.

DEZIRAS KORESPONDI

* DOMINGOS LUKATO ZA-KINDAKISA; C.P. 3819, Luanda, Angola.
* THOMAS CIMPAYE; Mishamo Esperanto-Klubo, p/a Revd. Pasteur Kinama Eustache, S.L.P. 243 Mpanda, Tanzanio. Li estas 27-jara, kaj korespondos pri sporto, turismo k.a.


américa, por la paz
Jamboree
Austral
VI JAMBOREE PANAMERICANO
VILLARRICA, CHILE 18 AL 26 DE ENERO DE 198